Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

24-a Jarkolekto * Decembro 2008 * N-ro 82

ISSN 1576-06

MOTRIL

tropika lumo ĉe la Mediteranea Maro



Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

COLABORADORES: Fátima JIMÉNEZ GARCÍA, Antonio Fabián JIMÉNEZ,
Cristina PÉREZ BAEZA,

ENHAVO

Resaluton !..... 3
Esperanto en Andaluzio..... 4
Atom-Bomboj super Andaluzio 12
La Brajla Skribado en la Infanoj kun limigita
vidkapablo kiel motora kaj lerta kapabligo 14
Novelo "*Klara kaj la Fajro*" 17
Cu Vi konsideras ke, Esperanto estas disvastiginda
Lingvo?..... 19
Andaluza Literaturo tradukita en esperanton
"La Unuan Fojon" 20
Paĝoj pri Nia Historio..... 24
Andaluza Kuirarto..... 26
Poezio 27
La Diversidad Lingüística como recurso educativo
en la enseñanza de la Historia en el ámbito
multicultural 28
Turismi en MOTRIL..... 31
La Ondanta Fervojeto 34
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio 36
Flamenko 38

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

RESALUTON !

Pro la fakto ke revuo estas farita de personoj, do kiu ajn eldonaĵo dependas ankaŭ de la ĉiutaga vivo de siaj redaktoroj. Pere de ĉi tiu laŭta penso mi emas ekskuzi pro la ne-apero de ĉi tiu revuo dum la lastaj monatoj de la jaro 2006 kaj dum la tuta 2007 kaj 2008. Jes, privataj viveroj tuŝis la normalan aperon de *Gazeto Andaluzia*, kaj kvankam mi neniam reziginis aperigi ĝin kiel eble plej ofte, mi devas konfesi ke novaj respondecoj en mia privata laboro malebligis mian dediĉon al la revuo organo de la Esperanto-Movado en Andaluzio dum ĉi tiu tempo.

Mi dankas al ĉiuj kiuj pere de iliaj mesaĝoj demandis monaton post monato kio okazis al nia revuo, tio pruvas, ke ĉi tiu eldonaĵo interesas. Nu, jen mia respondo, la numero 82-a de *Gazeto Andaluzia* jam aperis ĉar la vivo de nia revuo dependos de la deziroj de la legantoj kaj neniam de la eblecoj de la redaktoro.

Do, ene de ĉi tiu numero Vi povos legi pri la E-Movado en Andaluzio dum la jaroj 2007 kaj 2008. Verdire temis pri du gravaj jaroj por nia lingvo en nia lando. En la jaro 2007 okazis en Palos de la Frontera la 12-a Andaluza Kongreso de Esperanto kaj ankaŭ la Hispana Kongreso. Ĉeestis sufiĉe nombra partoprenantaro, inter ili multaj andaluzoj. Sur la paĝoj de nia revuo Vi povos legi pri kio okazis en Palos de la Frontera somere de la jaro 2007-a. Ankaŭ pri kelkaj aliaj aferoj.... pri la demarŝoj por renkontigi ĉe provinca asocio al la kadizaj geesperantistoj, pri la lernado de la internacia lingvo en Almerio fare de kelkaj personoj, pri kelkaj aliaj kursoj, pri vizitoj de eksterlandaj geesperantistoj, ktp. Kaj kompreneble aperas sur ĉi tiu numero de la revuo ne nur informoj, sed ankaŭ la kutimaj sekcioj de pasintaj numeroj.

Alia interesa okazintaĵo estis la 13-a Andaluza Kongreso de Esperanto, kiu okazis komence de la monato novembro de 2008 en Kordovo. Tamen, pri ĉi tiu Kongreso Vi povos legi nenion ĉi-numere, ĉar ĉiuj informoj pri ĝi aperos venontnumere, espereble dum la monato Februaro 2009-a. Nu, por fini mi volas lanĉi defion pri nia revuo, defio kiu baziĝas sur la du-jara silento de nia revuo, dum la jaro 2009, almenaŭ dum ĉi tiu jaro, la revuo aperos 6-foje en la jaro, espereble ni havos ĉies kunlaboradon por plenumi tiun revon. Do, ĝuu ĉi tiun 82-an numero de nia revuo, la venonta aperos fine de la monato Februaro. Kaj komprenble, se Vi trovas ĝin interesa, ne hezitu kunlabori kun ni, ni estas je Via tuta dispono por krei allogan eldonaĵon numeron post numero.

Amike,
José María Rodríguez, Redaktoro de Gazeto Andaluzia



ESPERANTO EN ANDALUZIO



➢ ARUNDO

La duan semajnfinon de la monato oktobro 2006, en la malaga urbo Arundo, la varmeta kaj agrabla vetero permesis al 24 geesperantistoj de Andaluzio kunsidi en alloga salono de la "*Casa de la Juventud*" por debati du gravajn temojn: la Movado en Andaluzio kaj la Hispana Kongreso okazunta en Palos de la Frontera (Onubo) en la jaro 2006. Malgraŭ manko da reprezentanto de Hispana Esperanto-Federacio, ni sukcesis debati la temon pri la Hispana Kongreso kaj verdire la etoso estis tre agrabla.

La ĉefa ĉeestanto estis la Urbestro de Palos de la Frontera, kiu tre interesiĝis pri la Kongreso kaj pretis helpi nin por ke la Kongreso realiĝu en lia urbo. Dum kelkaj horoj oni debatis *paceme* pri ĉi grava temo kaj ĉio estis pozitiva. Oni informis al la Urbestro pri la eblaj kunvenejoj, loĝejoj, propagando, afiŝo, ktp. La respondo estis pozitiva kaj li aldonis la ideon dissendi kurson de Esperanto per la loka televido en Palos. Krome li proponis al ni traduki interesan broŝuron pri la historio de Palos de la Frontera, kompreneble ni respondis jese.

Fakulo pri Kulturo de la Urbodomo de Palos, S-ro Eduardo García, ankaŭ ĉeestanto en la kunsido, devontigis sin eldoni la propagandon kaj afiŝon pri la Kongreso, do nia laboro estis doni ideojn... kompreneble ni multe laborus por okazigi sukcesan eventon. Post vespermanĝo ni revenis en la ĉambron por daŭrigi la kunsidon kaj debati pri la Movado en Andaluzio, kiu bonfartis kaj jam oni pretis labori per kursoj de Esperanto, metodo de Jorge Hess por la bazaj kursoj kaj *Gerda Malaperis* por progresintaj kursoj. Inter la ĉeestantoj oni disdonis librojn, videofilmojn kaj kompakt-diskojn al la profesoroj de Sevilo, Onubo, Granado, Arundo kaj Velez.

La plimulto foriris antaŭ noktiĝo, sed ankoraŭ restis grupito por ĝui la arundan nokton, la plej junaj haltiĝis ĉe pizejo kaj la ceteraj elektis normalan

trinkejon por bierumi kaj gustumi tipajn manĝaĵojn de la regiono. Pro kroni la "feston" ni kuraĝis eniri en ĉambron por gejunuloj kie la muziko ne tro akompanis. Ĝi pafis nin konstante, sed neniu plendis, kontraŭe ĉiuj bonfartis siditaj sur komfortajn sofaojn trinkante *cubas libres* kaj aliajn likvorojn.



Junaj Geesperantistoj en Arundo (Malago)

La dua tago, dimanĉo, ni preskaŭ malsaniĝis, ĉar la urbo Arundo estas malgranda sed monumentojn kaj malnovajn konstruaĵojn estas neeble vidi dum unu tago. Do, ni kuraĝis viziti la plimulton kun la promeso reveni al nia kara samideanino Fátima, kiu volante preparis ĉion por ke la renkontiĝo realiĝu.

Informis: Ángel Arquillos.

➢ KORDOVO

La Sekcio por Instruistoj de la Sindikato CSI-CSIF en Kordovo aperigis sur la lasta numero de sia informa bulteno divers-lingvan afiŝon por danki la kunlaboradon de siaj membroj.

Okulfrape aperas sur la centra parto de la afiŝo la vorto DANKON, tiel en la internacia lingvo. Vi povas vidi tion sur la apuda bildo.



CSI·CSIF

SECTOR ENSEÑANZA CORDOBA

¡GRACIAS!

Después de la serie de editoriales PREPARADOS, LISTOS y YA de los tres meses anteriores, el titular del presente no podía ser otro que el que es, como una forma de mostrar nuestro agradecimiento a los docentes de Córdoba y su provincia, por habernos otorgado su confianza.

Gracias a vosotros el fruto de un trabajo intenso y continuo durante cuatro años, voluntarioso, bien hecho y mejor intencionado, ha culminado con éxito.

El día 30 de noviembre ha sido la culminación de un proceso de crecimiento que se veía venir. Como habíamos anunciado, se han superado los máximos de afiliación conseguidos por CSI-CSIF en cualquier etapa de su historia.

Nuestro trabajo se ha plasmado en multitud de actuaciones de convocatoria y acompañamiento allí donde ha sido necesario o requerido, en su continua presencia en los medios de comunicación, escritos y no escritos, en la intervención ante personas, y

INDICE
1. ¡GRACIAS! PAG. 1

➢ ONUBO

Sub la titolo “Lingvo por la Espero kaj la Egaleco” la 22an de oktobro de 2005 aperis sur la ĵurnalo *EL MUNDO* (onuba eldono) artikolo pri la ekzisto kaj agado de la Onuba Esperanto-Asocio. La artikolo skize rakontas la historion de esperanto kaj la agadojn de la onuba grupo dank´al intervjuo kun ĝia prezidanto Rafael Mateos. La artikolon akompanas du fotografaĵoj prenitaj okaze de esperanto kurso.




'Lingvo por la espero kaj la egaleco'

➢ ARUNDO


La 7-an de majo 2006 finiĝis trimonatan esperanto-kurso okazanta ĉe la Junulara Domo de Arundo, organizata de la loka esperantistaro kaj kun la helpo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, sub la gvidado de nia arunda samideanino Fátima Jiménez. Kelkajn tagojn poste la Junulara Domo prezentis al la ĝenerala publiko de Arundo la agadojn ĉe ĝi organizitaj, inter ili, kompreneble, la esperanto-kurso. La prezento okazis en la ĉefa promenejo de Arundo kaj dum ĝi la arunda esperantistaro montris malgrandan kolekton de libroj kaj afiŝoj en kaj pri la internacia lingvo. Ĉar Fátima devos daŭrigi siajn superajn studojn for Arundo, ne estas certigita la okazigo de nova esperanto-kurso por la venonta jaro. Do, multajn dankojn Fátima pro viaj streboj kaj sindediĉo disvatigi esperanton en Arundo kaj nome de la andaluzia esperantistaro ni deziras al vi bonŝancon en viaj studoj.

➢ SEVILO

De la 26-a de oktobro ĝis la 8-a de januaro 2006 okazis en la urbo Sevilo la Ĉiudujara Internacia Ekspozicio pri Nuntempa Arto de Sevilo (BIACS2). Unu el la unuaj agadoj programitaj estis laboro de la usona artisto Renée Green, konsistanta en la pendumado de bonvenigaj afiŝoj en 200 balkonoj de la urbo. Ĉi tiuj afiŝoj enhavus saluton en la internacia lingvo esperanto. Temas pri flagoj (du malsamaj modeloj) kun la vorto *bonveno* en ruĝo kaj la fono en bluo. Tamen, finfine ĉi tiuj bonvenigaj afiŝoj ne estis pendumataj ĉe la sevilaj balkonoj, sed ja ĉe la ĉefa sidejo de la Arta Ekspozicio kiu bonvenigis ĉiujn partoprenantojn kaj vizitantojn pere de esperantlingva bonveno.



Afiŝo kun la teksto *BONVENON !*



Antonio Casas kaj Daniel Oncal okaze de intervjuo ĉe la kadiza ĵurnalo EuropaSur.

➢ KADIZO

Komence de la jaro 2008 la kadiza ĵurnalo *EuropaSur* aperigis artikolon informante pri la demarŝoj krei Kadizan Esperanto-Grupon. Verdire du esperantistoj de la kadiza provinco, Antonio Casas de Los Barrios kaj Daniel Oncala de Algeciras volas organizi la E-movadon en la plej suda andaluza provinco, kaj pro tio ili formis la grupon "Esperanto el Kadizo" kiu laboras kune kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo por "veki" tiujn dormantajn esperantistojn kiuj sendube ekzistas en la provinco. Se oni deziras kontakti kun ili bv. uzi la TTT-paĝon de la grupo: http://usuarios.lycos.es/esperantokadizo aŭ pere de la elektronika adreso: cadiz @ esperantoandalucia.org

➢ MARBELLA

Francisco Javier MARTIN, vicprezidanto de la Malaga Esperanto-Asocio "Marbordo de la Suno" prelegis komence de 2008 ĉe la kulturejo "Las Cañadas" en Marbella (Malago) pri Esperanto. La prelegon oni organizis kadre de la proklamita "Internacia Jaro de la Lingvoj". La celo de la prelego ne nur estis paroli pri Esperanto sed ankaŭ oni pristudis la eblecon organizi kurson de la internacia lingvo en ĉi tiu kosmopolita malaga urbo.

➢ SEVILO

De la monato februaro ĝis junio de 2008 okazis kurso de esperanto ĉe la Fakultato de Filologio de la Universitato de Sevilo. Kvankam la kurso ne havis akademian valoron estis gravega la okazigo de ĉi tiu kurso ĉe loko tiel prestiĝa kiel tiu de la sevila universitato. La kurson organizis Sevila Esperanto-Asocio kaj la instruistoj estis José Roldán kaj Antonio Rodríguez.

➢ ALMERIO

Ĉe la *Biblioteca Social de Almería*, str. Zagal 21, renkontiĝis ĉiuj mardoj je la 18:00a horo dum la jaro 2008 grupeto da interesitoj en la lernado de la internacia lingvo Esperanto. Temis pri komuna memlernado kun la helpo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, asocio kiu havigis al ĉiuj la necesajn lern-materialojn. Se iu deziras kontakti kun ĉi tiu grupeto bv. fari tion pere de la elektronika adreso bsalmeria (heliko) gmail.com

➢ JAENO

Jaena Esperanto-Asocio organizas kune kun la sindikato CNT kurson de la internacia lingvo en la sidejo de tiu laborista asocio. La kurso komenciĝis la 1-an de marto 2008, kaj kvankam okazas ĉe la sindikato kaj por ĝiaj membroj ĝi estas tute malfermita por ĉiuj interesitoj.


JAENA ESPERANTO-ASOCIO

➢ PALOS DE LA FRONTERA

De la 5-a ĝis la 8-a de julio 2007 okazis en la onuba vilaĝo Palos de la Frontera la 12-a Andaluza Kongreso de Esperanto, samtempe al la tie okazanta Hispana Kongreso de Esperanto. Feliĉe por la organizado de la kongreso oni ricevis la kunlaboron de la Palosa Urbestraro, sed nenio povus esti realigita sen la helpo de la onubaj kaj sevilaj samideanoj, speciale dankinda estis la laboro de Rafael Mateos kaj José Roldán.

La prelegoj abundis dum la Kongreso kaj ni speciale elstarigas tiun farita de nia malaga samideano A. Fabián Jiménez pri la Esperanto-Movado, post la prelego okazis vigla diskuto pri la temo en esperanto kaj en la hispana lingvoj. La pola televisa reĝisoro Roman Dobrzydski montris kelkajn siajn filmojn, pri Ĉinio, Valencio, Majorko kaj ankaŭ pri la andaluza urbo Sevilo sub la alloga titolo "Sevilla Maravilla".


Okazis ankaŭ noktaj spektakloj, kiel la koncerto de nia malaga samideano Solo, ritmajn kantojn, kaj ankaŭ tiu de la kazaĥaj gesamideanoj Ĵomart kaj Natasha, kiuj allogis la ĉeestantojn kun tre belaj kaj dolĉaj kantoj.



Rafael Mateos kaj José Roldán, ĉefaj kunorganizantoj de la Kongreso.

La andaluza esperantista junularo aktivis dum la Kongreso, tiel la junaj andaluzoj parolis pri la ĝermo de la eble naskiĝonta AJEU (Andaluza Junulara Esperantista Unuiĝo), esperable tio signitos la aperon de nova generacio en la Esperanto-Movado en Andaluzio, kio sendube certigos la ekziston de la internacia lingvo en Andaluzio.

Dum la Kongreso ankaŭ okazis momentoj por turismo, oni vizitis la plej famajn vidindaĵojn de Palos de la Frontera, tiel la Monaĥejon de la Rábida kaj la havenon el kie Kristoforo Columbo eliris okaze de la unua vojaĝo en Amerikon.



Amikema babilado dum la Kongreso de Palos de la Frontera, julio 2007

Unu el la plej kortuŝaj programeroj estis la omaĝo al S-ano Alfonso Escamilla. La Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo prezentis la libron "Apud Centjara Olivarbo", eldonita de la andaluza asocio kaj celanta esti modesta omaĝo al unu el la plej gravaj samideanoj en la historio de la movado en Andaluzio. Bedaŭrinde neniu familiano de la S-ro Escamilla povis ĉeesti, do la memor-tabuleto dediĉita al li estus disdonita poste al familiano en Linares, la urbo kie Alfonso Escamilla loĝis dum la lastaj jaroj de sia vivo.

Resume, oni povas aserti, ke la Andaluza kaj la Hispana Kongresoj okazintaj en Palos estis partoprenindaj renkontiĝoj, al ili ĉeestis sufiĉa nombro da gejunuloj, kio certigas la estontencon de la lingvo kaj multaj, pli ol 80, gesamideanoj venis el aliaj landoj, kio pruvas la allogecon de nia andaluza lando ĉe la eksterlandaj geesperantistoj.

Komuna manĝado okaze de la Kongreso



➢ KORDOVO

Pro profesiaj kialoj Marcos Salas kaj sia edzino Tatiana vizitis dum la monato januaro 2008 Andaluzion. Komence de tiu monato ili restis en Kordovo. Ili estas ŝip-inĝenieroj en la Universitato de Valdivia, sude de Ĉilio kaj gastigantoj de Pasporta Servo en tiu urbo.




J.M.Rodríguez, Tatiana kaj Marcos Salas ĉe tipa kordova strato.

Kvankam la vizito verdire estis ege mallonga, unu tago ne sufiĉas por viziti Kordovon, ili povis ĝui la etoson ĉe la Moskeo, la mallarĝajn stratojn, la oranĝ-arbojn kaj kompreneble la andaluzan gastronomion. Post Kordovo ili marŝis en Kadizon, kie ili devis partopreni en universitatan kongreson.

➢ ESTEPONA

Nia juna samideano Alejandro Sánchez prelegis pri Esperanto en la Gimnazio "Mar de Alborán" en Estepona, kie li mem estas lernanto, okaze de la Internacia Tago de la Libro la pasintan 23-an de aprilo. Kelkaj semajnoj antaŭe, dum la monato februaro, li akompanis la britan esperantiston John Gobourne dum vizito al tiu Gimnazio.

Okaze de la vizito la profesoro respondeculo pri la Biblioteko ricevis ekzemplerон de la "Gran Diccionario Español-Esperanto" de Fernando de Diego. Oni devias diri, ke ĉe la Gimnazio "Mar de Alborán", kaj dank'al la streboj de Alejandro Sánchez, ekzistas sekcion enhavanta librojn en la internacia lingvo.



Alejandro Sánchez kaj John Gobourne ĉe la Gimnazio de Estepona

ATOM-BOMBOJ SUPER ANDALUZIO

Unue Hirośimo, poste Nagasako, trie... ĝis nun la homaro nur travivis tiujn du terurajn nukleajn atakojn. Sed, ĉu atom-bomboj povis ekspluati en Andaluzio en la jaro 1966? Ni konu la rakonton. Giganta bomb-aviadilo B-52 de la usona armeo patrolis super la Mediteranea Maro je la 10-a horo matene de la 16-a de marto 1966. La armiloj śarĝitaj en tiu aviadilo estis kvar hidrogen-bomboj. En tiu momento la aviadilo devis reprovizi dum flugado kaj tiel, post 12-a hora patrolado, reveni en sian usonan bazon.

La patrin-aviadilo eliris el usona bazo en la andaluza urbo Sevilo, ĝi celis reprovizi la bomb-aviadilon pere de 110.000 litroj da fuelo. Temis pri ĉiutaga manovro plenumita de la grandaj aviadiloj patrolantaj apud la soveta land-limo super la orienta Mediteranea Maro. Sed tiu tago de la jaro 1966 io ne marŝis bone. La patrin-aviadilo troe alproksimiĝis al la alia aviadilo kaj do, la kolizio estis ne-evitebla. La kapitano de la patrin-aviadilo regis la flug-maŝinon kaj




sukcese revenis en la sevilan bazon, tamen la avianaro de la bomb-aviadilo devis salti per paraŝuto ĝuste antaŭ la eksplodo de la giganta B-52 kiu disŝute falis en la teron, tuj apud la vilaĝo Palomares en la andaluza provinco Almerio.

Inter la restaĵoj falitaj troviĝis kvar hidrogen-bomboj sep metroj laŭlonge. Neniu bombo ekspluatis, feliĉe tio ne okazis ĉar la bomboj ne estis prajmitaj, la risko, do, reale estis la fuĝo de plutonio en la aeron kaj en la teran surfacon.

Tuj post la akcidento membroj de la usona armeo venis rekte el Ameriko en la zonon. Dume, la usonaj militistoj informis al la hispanaj aŭtoritatuloj, sed neniam al la inform-servoj, al ili oni sciigis, ke okazis aer-akcidento sen viktimoj, nenion oni diris pri la bomboj. Sed la ĵurnalistoj konis la alvenon de kriz-okaza teamo rekte el Usono kaj ankaŭ la tutan fermigon de la zono eĉ al la enloĝantoj kaj posedantoj de la kamparoj. Do, oni informis pri la ebla ekzisto de atom-bomboj ene de la falita aviadilo. Malgraŭ tio la 2.500 enloĝantoj de Palomares ricevis nenian informon.

Unuamomente oni trovis tri bombojn sur la kamparo tuj apud la vilaĝo, ili frakasiĝis kaj disverŝis en la aeron plutonion kaj uranion. Tamen, ankoraŭ mankis unu ne-trovita bombo. Kie ĝi estis? Fiŝkaptisto laboranta en tiu zono, nomita Francisco Simó, vidis la akcidenton kaj poste metalan objekton kun du paraŝutoj falis apud la fiŝkapt-ŝipo.

Kiam li alvenis en la havenon li rakontis la aferon al la Polico, tamen, pro la fakto ke la serĉado de la bomboj estis tute sekreta afero, eĉ ne la policanoj sciis ion pri tio. Finfine la rakontoj de Francisco Simó atingis la usonajn militistojn, kaj post esplor-demandado ili sciis, ke tiu metala objekto sendube estis la kvara bombo. Tamen la fiŝkaptisto ne povis memori ekzakte la lokon. Fine, oni decidis traserĉi 15 kvadratajn kilometrojn, kie la maro havis eĉ 1.500 metran profundon.



La usona armeo sendis en tiun zonon 20 ŝipojn, 2.500 ŝipanarojn, 125 skfandristojn kaj 3 malgrandajn sub-marŝipojn. La ĉefa celo de la tiel nomata operacio "Rompita Sago" estis trovi la bombon. La risko estis duobla, se la sekureciloj de la bombo oksidiĝis la radioaktivaj restaĵoj povus malpurigi la tutan mediteranean mar-bordon de Hispanio.

Krome, se la usonanoj ne trovos la bombon, la sovetaj ŝipoj povus serĉi ĝin kaj se trovita, koni militajn sekretojn de la usonaj armiloj.

Finfine, la 15-an de marto, du monatoj post la akcidento unu el la malgrandaj sub-marŝipoj trovis 800-metran spuron sur la mar-fundo. Fine de la spuroj troviĝis du paraŝutoj ligitaj al metala objekto. Dum tri semajnoj la maristoj laboris por preni zorgeme la bombon, kaj fine la 7-an de aprilo 1966 la hidrogen-bombon oni prenis kaj unuavide ĝi ne suferis damnaĵojn.

Atom-energian katastrofon oni evitis. Hodiaŭ, 40 jaroj poste, ankoraŭ oni mezuras en la zono la nivelojn de plutonio kaj uranio, kaj plejeble neniam oni konos la tutan veron.

LA BRAJLA SKRIBADO EN LA INFANOJ KUN LIMIGITA VIDKAPABLO KIEL MOTORA KAJ LERTA KAPABLIGO.

Cristina Pérez Baeza

De ĉiuj konata, ke la brajla sistemo estas la rimedo per kiu la personoj kun limigita vid-kapablo lernas legi kaj skribi, tio estas ĉifri kaj deĉifri tekstojn, verkitaj sur papero se temas pri personoj kun sufiĉa vid-kapablo aŭ pere de punktetoj gravuritaj se temas pri personoj kun la vid-kapablo limigita. La brajla sistemo, elpensita de la franca Louis Braille en la jaro 1834, eĉ adaptiĝis ankaŭ al la komputila mondo.

Sed, kioma aĝo estas la plej adekvata por ekinstrui ĉi tiun sistemon al la infanoj kun limigita vid-kapablo? Jam en la unua vivo-jaro la infanoj kapablas "respondi" al la aŭditaj sonoj, tiel bebo ne havanta limigitan vid-kapablon povas asocii sonojn kun bildoj, ĉefe la vizaĝoj de amataj familianoj. Do, oni povas aserti, ke tiuj vizaĝoj estas la unuaj "tekstoj" kiujn bebo kapablas legi. Kio okazas al infano kun limigita vid-kapablo?



Louis Braille
1809 - 1852

Se al tiu bebo ni alproksimigas objekton por esti tuŝata, ni kapabligas al li "legi" la eksteran mondon. Do, la infano kun limigita vid-kapablo povas legi pere de siaj manoj, kaj jen la principo de la legado kaj skribado per la brajla sistemo.

Tiel, je la sama aĝo kiam oni alproksimigas objektojn al vid-kapablaj infanoj cele asociigi ambaŭ aferojn, ni devas faciligi al la ne-vid-kapablaj infanoj materialojn kun malsimilaj strukturoj kaj reliefoj kiuj povos esti tuŝataj, do "legitaj", pere de liaj manoj.


La infano lernos asocii la objektojn kun ĝia reliefo kaj rando, se samtempe ni havigas al li paperon aŭ alian materialon kie aperas gravurita la nomo de tiu objekto ni ekkapabligos al li legi kaj skribi per la brajla sistemo. Do la respondo al la demando kiam oni devas ekinstrui al la ne-vid-kapablaj infanoj la brajlan sistemon estas tre simpla, je la sama aĝo kiam oni ekinstruas legi al la vid-kapablaj infanoj.

La maniero alproksimigi la infanon al ĉi tiu nova sistemo ĉifri kaj deĉifri la nomojn de la objektojn devas esti plenumita kiel eble plej nature. Unuamomente li devos koni, laŭ la brajla sistemo, la nomojn de la gepatroj kaj de la ceteraj familianoj, poste tiujn de la ĉirkaŭantaj objektoj, ekz. ludiloj, lia glaso por trinki akvon, ktp. Poste, oni tondilos paperon laŭ la formo de pli grandaj objektoj kiel fruktoj, arboj, bestoj, objektoj troviĝantaj ĉe li, kaj ĉiam estos necese adicii la nomon gravurita sur la papero, ĉi tiel li perfektigos sian kapablon legi la brajlan sistemon. Sed, ĉi-foje mi pritraktos la temon kiamaniere faciligi la lertecon por skribi pere de tiu sistemo.

Unue, gepatroj kaj profesoroj devas helpi al la infano lerte uzi la manojn. Antaŭe la bebo akiris tiun lertecon ĉefe pere de konstanta tuŝado de la objektoj kaj la vizaĝoj, tio etis lia unua rimedo por legi. En la lernejo la infano akiros movan lertecon kiam li uzos la tondilon, la pikilon, tiel li lernos ĉifi paperojn aŭ krei figuretojn uzante knedo-paston. Ĉi tiu pasto estos la unua rimedo por skribi laŭ la brajla sistemo. Pere de ĝi, la infano kapablos uzi la pikilon por kopii la punktetojn proponitaj laŭ regula kaj ekzakta situo, tio estas la brajla sistemo.

Bazaj konoj de la brajla sistemo

La brajla sistemo estas komunikilo por kies regado estas necese akiri konojn kaj kapablecon. La unua nepra koncepto akirota de la infano estas la reversebleco, ĉar en la brajla sistemo oni skribas dekstre-maldekstren, tamen oni legas maldekstre-dekstren. Ĉi tiun reverseblecon li ekkomprenos dank´al la skribilo nomita “brajla skatolo”.



Temas pri skatolo kun du flankoj, unu el ili utilas por meti pingletojn kiuj aperos inverse kaj reliefite sur la alia flanko de la skatolo. Ĉi tiu skrib-ludilo utilos por komprenigi al la infano ke, por skribi estos necese komenci el la dekstra flanko, kaj inverse la “teksto” aperos sur la maldekstra parto, tiu estas la reversebleco de la brajla sistemo, koncepto nepre konenda por komenci legi kaj skribi.

Kiel al ĉiuj infanoj ankaŭ al tiuj ne vid-kapablaj estos necese instrui unualoke la vokalojn, poste la konsonantojn kaj fine la numerojn, kaj tiam oni formos simplajn vortojn en la brajla skatolo.

La Genera Signo




Temas pri la baza unuo de la brajla sistemo. Ili estas ses punktetoj lokigitaj laŭ du vertikalaj linioj. La genera signo troviĝanta en la brajla skatolo por infanoj estas tre granda, tiel li eklernos skribi.

Genera Signo

La Skribo-Tabulo

Kiam ni parolas pri ĉi tiu lernilo kompreneble ne temas pri la sama skribo-tablo troviĝanta en ĉiuj klas-ĉambroj. Kiam ni mencias la skribo-tablon uzita de infanoj kun vid-kapablo limigita temas pri du tabletoj unuigitaj en unu el la flankoj.



Skribo-Tabulo

Meze de ambaŭ tabletoj aperas proksimume 30 generaj signoj, sur kiuj la infano lernos skribi. Malsimile al la brajla skatolo la generaj signoj troviĝantaj sur la skribo-tabulo estas malgrandaj, je la sama nivelo al la realaj tekstoj legitaj de personoj regantaj la brajlan sistemon.

La Pikilo

Temas pri la ilo per kiu ni reliefigos la punktetojn de la brajla sistemo sur la skribo-tablon aŭ sur la folion. Ekzistas diversaj tipoj de pikiloj laŭ la maniero meti la fingrojn. Estas tre grave kaj utile instrui al la infano uzi la pikilon uzante ĉefe la forton de la ponardo, kaj ne de la brako mem. La pikilo devas esti bone uzata kaj kompreneble unuamomente rapideco ne gravas sed ja lerteco.




Pikilo

Post lerni la vokalojn, la konsonantojn kaj la numerojn la infano abude kopios tekstojn por praktiki kaj atingi sufiĉan lertecon, kio pligrandigos lian memoron kaj atenc-kapablon.

NOVELO

Klara kaj la Fajro




Kvankam ĉi tio povas ŝajni nekredebla Klara amis la varmegon. Sed tute ne temis pri ekzistanta varmo, tiu varmo devis esti kreata de ŝi mem. Eble pro tio, kiam ŝia kunulo amaris ŝin, Klara nur povis senti tiun plezuron se ŝi samtempe sentis varmon. ŝi alproksimiĝis tiom apud la kameno, ke ŝia kunulo ofte devis distanciĝi por eviti la fajron kiam ili seksumis.

- *Cu vi ne povas koncentriĝi en mi?* – Li admonis ŝin post vidi ke ŝiaj okuloj atente rigardis la fajron de la kameno.
- *Mi bedaŭras, kara, mi ege bedaŭras.* –ŝi respondis. *Mi vere sentas plezuron apud vi, sed samtempe…tiu fajro, tiuj fajro allogas min.* Tiu estis la plej ofta respondo.

Kaj tio ne estis stranga. Infan-aĝe, oni diris, ke ŝi estis filino de flamo. Unuavide tio eĉ povus esti vera. ŝi estis alta, ruĝ-hara kaj ŝi neniam tenis ŝin kvieta. Rideteme ŝi pensis, ke ŝi naskiĝis ene de fajro, eble pro tio ŝi bezonis ĝin por vivi. Klara ankaŭ amis la kontraŭojn. Pro tio kiam ŝi sidiĝis apud la fajro por legi, pensi, ĝoji aŭ simple por vidi kiel la herbo kreskis en la ĝardeno, ŝi bezonis senti ion frida. Tiel, ŝi povus senti samtempe la fridan plankon kaj la varman fajron de la kameno.

Okazis tiutage, ke ŝia kunulo alproksimiĝis por ekkaresi ŝin. Ŝi memoris liajn plendojn kiam li sentis ŝin distanca, pro tio ŝi preferis ne rifuzi liajn manojn. Al tiuj fridaj manoj sekvis fridaj lipoj kaj tuta frida korpo. Klara ne estis komforta, sed ŝi preferis silentiĝi. Tiu momento rapide pasus kaj ŝi baldaŭ forgesus tiun malvarmon. Jesja, la momento rapide pasis, eĉ pli rapide ol normale. Do, kiam ŝia kunulo stariĝis Klara ankaŭ faris tion. Jen la unua fojo ŝi sentis ne nur la malvarmecon de la planko sed ankaŭ la malvarmecon de sia kunulo.

Stare, Klara denove vidis la kamenon. Dum la tuta tempo kiam ŝi kaj la kunulo seksumis la kameno ne ĉesis varmigi la ĉambron per sia fajro. Ŝi eĉ kapablis aŭskulti la fajron kiam ĝi konsumis la lignaĵojn. Sed ĝuste tiam, kiam ŝia kunulo ne estis ĉe la ĉambro, Klara kaj la fajro estis tute solaj. Klara komplice rigardis la fajron, kaj se ĝi estus ŝia amanto... ŝi ridetis. Ŝia korpo, tiam frida, varmiĝis kaj tiu virino alta kaj ruĝ-hara, tiu flamo kiu infan-aĝe eliris el la fajro en ĝin revenis...



Kiam ŝia kunulo revenis li serĉis ŝin. La pordo restis fermata, ankaŭ la fenestro. Ŝi estis nuda, do ŝi ne povus eliri for. Tamen li vokis ŝin sed neniu respondis. Liaj okuloj serĉis tra la tuta ĉambro, tamen tie neniu estis. La tapiŝo estis sur la planko, ĝi estis frida, malfacile imagi ke, antaŭ kelkaj minutoj paro amaris sin sur ĝi.

Li serĉadis ŝin dum kelkaj horoj, venis poste pliaj personoj por helpi, neniu vidis ŝin eliri for kaj neniu sukcesis trovi ŝin.

En la ĉambro ĉio restis same dum multe da tempo. La frida tapiŝo restis sur la planko kaj oni diras, ke la kameno neniam estingiĝis. Kvankam restis dirаĵo ne tute klara, oni diris ke ene de la flamoj de tempo al tempo eblas vidi rideteman ruĝ-haran vizaĝon.

Ĉu Vi konsideras ke, Esperanto estas disvastiginda lingvo?

Verŝajne Vi ĉiam pensis, ke Esperanto estas bonega ideo kaj projekto kiu meritas ĉies helpon. Se jes, ĉu Vi ne kredas, ke nia lingvo kaj la movado en Andaluzio meritas ankaŭ Vian helpon kaj kunlaboron?

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas asocio kies ĉefa celo estas disvastigi la internacian lingvon en nia lando, kaj ion ni atingis dum la 25 jaroj da ekzisto de nia asocio... 13 kongresojn kie Esperanto estas vivanta lingvo, 2 librojn eldonitaj, revuojn regule aperantaj, multnombrajn kursojn de la internacia lingvo, TTT-paĝon kie oni prezentas informojn pri Esperanto en Andaluzio...

Do, kion oni bezonas? Vian helpon!!! Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas asocio kie agadas voluntuloj ricevantaj nenies oficialan helpon, do ni bezonas la kunlaboron kaj la membrecon de ĉiuj kiuj pensas, ke Esperanto estas apoginda ideo ankaŭ ĉi tie en Andaluzio.

Por esti membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo nur estas necese kontakti kun la Asocio aeu @ esperantoandalucia.org

La membrokotizo por la jaro 2009 estas 18 eŭroj, kaj la bankokontoj kie eblas pagi ĝin estas:

- Caja General de Ahorros de Granada
  2031 0225 54 0100187657

- BBVA
  0182 4106 71 020 7160717

Oni petas Vin, ke okaze de la pago, petu al la dungito de la banko aŭ de la ŝparkaso, ke li notu en la dokumento la jenon: Via nomo kaj la jaro 2009.

Multegajn Dankojn, la E-Movado en Andaluzio meritas Vian helpon.

Andaluza literaturo

(tradukita en esperanton)

LA UNUAN FOJON

de **Manuel HALCÓN**
Sevilo 1900 – Madrido 1989
(tradukis J.M.R.H.)

Mi devas diri, kvankam tio povas ŝajni stranga, ke Consuelo* estis unu el la virinoj de mi konataj kun pli granda klaso, kvankam li estis bordel-mastrino. Kaj ne eblas pensi, ke mi ne konis alt-klasajn damojn. La plej alt-rangaj virinoj en Sevilo tuŝis mian tonditan har-franĝon kiam mi estis infano. Poste mi trovis ilin en mia propra familio; tamen ĉi lastaj virinoj lernis herede la stilon kaj la formalecon. Consuelo, ne; ĉio naskiĝis el ŝi, kaj ĉio formiĝis en ŝi sen alia helpo ol la lumo de Triano** ene de povra mondo, tie kie neniun indas imiti.



En la amas-loĝejo kie ŝi naskiĝis kaj loĝis ĝis sia deksesjara vivo-jaro kiam ŝi foriris, ŝi neniam malestimis tion kio ŝin ĉirkaŭis. Li nur prenis la decidon forlasi tiun etoson kiel eble plej baldaŭ. Kaj ŝi foriris en luigita veturilo, tiuj kun koĉero en kaskedo kaj ĉevalo kun granda tintilo pendanta sub la kolo. Ene de la veturilo atendis konata kaj efika bordelestrino kiu, kiam la kaleŝo ekrapidiĝis diris al la junulino kiel liberigaj vortoj:

- Nu, finiĝis jam la malsato.

Kiom da soroj kaj soboj travivis tiu virino kiun mi jam konis kiel mastrinon de la bordelo de la Placo Pozo Santo, en Sevilo, dum la dudekaj jaroj. Nek la placo nek la domo ekzistas jam.

Notoj de la tradukanto:
* prononcu *consŭelo.*
** sevila kvartalo.

De ĉiuj konata, ke tiu domo ĝuis altan klason; male al tiuj kie regis la grobeco kaj la vulgareco. Kaj ne pro la fakto ke la klientoj estis pli seriozaj –la plejmulto el ili estis mez-aĝuloj- sed ĉefe ĉar tie regis ne nur la mastrino. Ĉe la Pozo Santo regis la prezidanteco. La senhontuloj kaj la lascivuloj estis haltigataj de strečita rigardo, kaj de mano kiu stariĝis el la brako de la ĉefseĝo, senvoĉe. Ĉi tio ja sufiĉis. Consuelo en sia domo permesis al neniu translimiĝi. Tio provokis, ke la renkontiĝoj estis bon-etosaj, kvankam iomete tedaj. Ĉi lerte akcelis la bonan etoson kaj la tedan, kun la lerteco de tiu kiu perfekte konas ambaŭ seksojn, kaj ofte kiam diboĉemulo ĵus ekdiris ion ne-konvena, tie estis Consuelo kiel



senindulga juĝistino. Multaj ne revenis, tamen ĉe ŝi neniam mankis viroj.

Mia sorto volis, ke en tiu domo mi komencis mian karńan amon (la alian amon, tiu de la versoj kaj la kisoj, mi jam konis). Kaj malgraŭ la pasintaj jaroj mi ankoraŭ kapablas revivigi la impresojn de tiu unua tago, de tiu unua korp-al-korpo.

Kiam mi petis al mia kuzo, la plej diboĉa el mia familio, esti akompanata al tiu domo li res--

tis dubiteme kiel se li konsultis al sia konscienco. Mi sentis tion, kaj mi pensis, ke mia kuzo, antaŭ diboĉulo ankaŭ estis membro de la Sankta Kunfrataro de la Kristo de la Silento, do mi devis eviti al li skrupulojn kaj mi tuj diris:

- Ne timu, tio ne skandaligos min, ne temas pri mia unua fojo.

Tamen, tiu ja estus mia unua fojo, kaj ankaŭ estis vere, ke mi jam ne povis elteni plu la erotikajn dezirojn de mia korpo.

Trapasante la enir-pordon, post la unua pordo maldekstre aperis la manĝo-ĉambro. Kaj tie Consuelo, kun sia kol-ĉeno el oro kie pendumiĝis medaloj de la Sinjoro de la Granda Povo kaj de Nia Madono de la Espero*, trastudis ĉiujn kiun venis. Al mia kuzo ŝi lanĉis rideton ĉar antikva kliento. Al mi ŝi fiksis sian rigardon, kaj mi regis mian konfuzon ĉirkaŭirante la tablon por saluti ŝin ceremonie, kiel oni salutas

Noto de la tradukanto:
* *temas pri du religiaj figuroj tre adorataj en Sevilo.*

damon. Ŝi respondis:

- Sidiĝu vi ĉi tie; cedu al li vian lokon, junulino.


La junulino stariĝis kaj tie mi troviĝis tuj apud la mastrino de la burdelo. La konversacio daŭriĝis laŭ ĝeneralaj temoj kie ĉefe partoprenis mia kuzo, la granda afablulo, kiel ĉiuj konis lin; tiam Consuelo diris al mi mallaŭte:

- Se vi deziras esti okupata, faru tion kun la virino kiu tuj venos. Antonia voku al Encarnita*!

Mi vidis, ke Consuelo, kvankam avertita de mi pri nenio sed plejeble pro mia konfuzo aŭ pro la ne-kutima maniero esti salutata, sciis, ke temis pri mia unua fojo kaj pro tio mi bezonis protektadon. Ne estas strange ke post tiu ago, mi, senpatrina knabo, emociiĝis. Mi pensis, ke ŝi havigus al mi ankaŭ novican prostituitinon. Sed tute ne; kiam aperis Encarnita salutante kaj ridetante al ĉiuj, mi vidis ke ŝi ankoraŭ estis juna; sed ne tute juna, ŝi eĉ havis raŭkan voĉon.

- Se ŝi plaĉas al vi, iru. Mi konsilas ŝin por vi.

Ne havante mi tempon por kompari, mi pensis, ke kvankam ne temis pri la plej bela ja almenaŭ estis la proponita de Consuelo, al kiu mi konsideris tiu vespero mian bapto-patrinon. Mi diris nur:



- Nu, kun via permeso.

Mi stariĝis kaj iris en la pordon. Encarna eliris en la puton:

- Ek, mia knabo.

Kiam mi supreniris la ŝtuparon mi rigardis ŝiajn povajn krurilojn. Ne ekzistas vortoj, aŭ almenaŭ mi ne trovis ilin, por priskribi la delikatajn petolaĵojn, la molan komprenemon per kiu tiu virino stagnis mian senkulpan erotikajn dezirojn dum pli ol unu horo. Antaŭ ol malfermi la pordon ŝi demandis al mi:

- ĉu vi revenos?

- Milfoje mi revenos –mi respondis kaj eĉ pliajn mi pensis.

* prononcu: *enkamita*.

Tamen kiam en la koridoro mi pagis al la servistino, mi malfeliĉe aŭskultis, ke ŝi avertis al Encarnita:

- Ek, alia viro atendas.

Kaj ŝi demandis:

- Kiu?

Tiu "kiu" penetris min kiel ponardon enpuŝita de tiu mano kiu ĵus antaŭe tiel milde karesis min.

La balzamon metis al mi Consuelo. Mi adiaŭis ŝin.

- Kiel iris ĉio?
- Plezurege.

Mi kisis ŝin kio tio ŝokis al ĉiuj.
Consuelo diris:

- Nu, vi jam provis tion, atingu bonan fianĉinon kaj geedziĝu.

"Baldaŭ komencas la junulo !" mi aŭdis diri al iu kiam mi eliris. Mi neniam revenis. Ofendis al mi tiu "kiu", vundita de mil ponardoj kaj feliĉa samtempe. Tio okazis kaj mi ne deziris reveni hejmen tiel baldaŭ.

Mi trapromenis la urbon ambaŭdirekte, oni admonis min ĉar pro mia aĝo ankoraŭ eblis la admonoj. Neniu sciis kio okazis al mi dum tiu vespero; neniu konis ĉion. Kaj dum la sekvanta tago, zorgeme, mi demandis al mia fratino:

- ĉu vi notas ion malsimila en mi?

Si respondis jese, ŝi notis ion, sed ŝi ne sciis pri kio temis ekzakte.

- Kial vi ne rakontas al mi kio okazas ?


Post multaj jaroj mi sciigas ĉion al folio.

Pasis multaj jaroj, kaj jam kun familio kaj idaro, mi sciis, ke Consuelo ĵus forpasis, mi iris al ŝia entombigo. Tie estis multaj personoj kaj kelkaj eĉ kun granda doloro. Dum mi preĝis mi prenis folion el mia agendo kaj mi skribis: "Adiaŭ, Consuelo, unu fojon vi estis mia patrino". Mi lokiĝis en la rando de la tombo kaj mi lasis fali la folion sur la ĉerkon, samtempe la fosiloj sonis en la tero.

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

FORPASIS ANTONIO GONZÁLEZ ÁLVAREZ *AGA*



Antonio González Álvarez

Venis ĉe Andaluzia Esperanto-Unuiĝo trista novaĵo: la forpaso de nia kara samideano Antonio González Álvarez (AGA). Verŝajne tiuj kiuj aktive movadas en Andaluzio de antaŭ pli ol 15 jaroj memoras lin. AGA lernis aŭtodidakte la internacian lingvon pere de la franca libro-metodo "Junulkurso" kaj de tiam, li uzis ĝin por instrui esperanton al apuduloj. En Torokso, sia vilaĝo, li kontaktis kun la Popola Universitato kie li instruis esperanton dum kelkaj jaroj.

Li tuj kontaktis kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, asocio al kiu li apartenis ekde la unuaj momentoj de nia socia vivo. Li oferis sian helpon kaj ankaŭ sian urbon por organizi en la jaro 1987 la Andaluzan Kongreson de Esperanto, temis pri speciala kunveno ĉar oni festis la centjariĝon de nia lingvo. La kongreso estis plene sukcesa, partoprenis sepdeko da gesamideanoj de la tuta Andaluzio, ĝis tiam temis pri la plej multenombra Andaluza Kongreso de Esperanto.

AGA serĉis lerte kontaktojn por atingi taŭgan kongresejon kie oni povis trankvile kaj komforte paroli en Esperanto. Torokso kaj la laboro de AGA kiel organizanto de la tiutempaj andaluzaj kongresoj estis tiel sukcesaj, ke Andaluzia Esperanto-Unuiĝo decidis reorganizi siajn kongresojn tie en Torokso dum la sekvantaj jaroj.


Antonio atingis la nomigon de unu el la plej gravaj avenuoj de la marborda kvartalo de Torokso per la nomo "Esperanto", ĉi tiel la Avenuo Esperanto en Torokso estas hodiaŭ unu el la plej longaj stratoj portantaj ĉi tiun nomon en la mondo. Okaze de kongresoj kaj kursoj en Torokso AGA eldonis kaj disdonis inform-broŝurojn en la hispana kaj en la germana lingvo, ĉar Torokso estas turisma urbo en la Suna Marbordo plena je germanoj, lia intenco estis diskonigi esperanton al ĉiuj enloĝantoj en

la zono. Sed unu el la plej sukcesaj kaj memorataj agadoj de Antonio estis la subskribo de kontrakto inter la turism-agentejo *Esperantotur* kaj Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, kio faciligis la alvenon en Andaluzion de polaj turistoj. Tio estis ebla dank´al la streboj de AGA kiu serĉis en sia vilaĝo dekon da taŭgaj apartementoj por gastigi tiujn turistojn.

Antonio akceptis ĉiujn proponojn kun afabla rideto kaj tio ja helpis atingi niajn projektojn kaj revojn. Lia afabla kaj trankvila parol-maniero, kune kun lia konstanta bon-humoro, estis kora bonveno al la dekoj da personoj kiuj ĉeestis dum tiom da jaroj la andaluzajn kongresojn de Esperanto en Torokso.

Antonio restos en la memoro de tiuj gesamideanoj kiuj havis la bonŝancon koni lin persone kaj labori apude. Al tiuj kiuj ne konis lin nur indas sciigi, ke forpasis bona esperantisto.

Antikve oni konsideris, ke la plej bonaj personoj mortas jun-aĝe, eble tiu greko dirinta tion pravis, sed ve.... Tiel juna, apenaŭ kvardekkelkjar-aĝa! Pace ripozu AGA!



Avenuo Esperanto en Torokso (Malago)

Por kontakti kun la Historia Arĥivo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo:

Apartado de Correos 611
14080 Córdoba

Andaluza Kuirarto



Melongenoj kun Melaso

La araba kuir-arto estas ankoraŭ viva en multaj manĝaĵoj de la kordova gastronomio. Tiel, ĉe multaj famaj restoracioj de la urbo Kordovo abundas la manĝaĵoj bazitaj je la ŝafidaĵo, la migdalo aŭ la mielo.

Ĉi-numere ni parolos pri tipa kordova manĝaĵo kies unu el la ĉefroluloj estas la mielo, sed atentu ne la abel-mielo, sed la melaso, ankaŭ konata en Andaluzio kiel *suker-kana mielo*.

La alia bazo de ĉi tiu manĝaĵo estas la melongeno, temas pri plankto origine persa kiu eniris en Eŭropon pere de la araboj. Do, jen manĝaĵo tipe al-andalusa. Gustumu ĝin.

Ingredientoj:

* Unu melongeno.
* Faruno, prefere riz-faruno, 125 gramoj se du personoj.
* Oliv-oleo.
* ½ glaso da biero (blonda ne nigra).
* Du ovoblankoj.
* Melaso.
* Salo.
* Akvo.

Jen la farado:

Ni trančas la melongenon laŭ malgrandaj bendoj, ankaŭ eblas rond-forme laŭ la propra plaĉo. Ni salas ĝin kaj ni atendas proksimume du horojn, tiel la melongeno perdos sian maldolĉecon. Estas eble mergi ĝin en lakton, tiel kiam ni friktos la melongenon ne aperos tiom da graso.

Dume, oni preparas paston kun faruno, biero, du kuleroj da oliv-oleo kaj iomete da salo. Ĉi tiu pasto devas ripozi dum du horoj. Al la pasto ni aldonos la du ovoblankojn batitaj ĝis densiĝo.

Ni eltiros la melongenon el la akvo, lasante ĝin sur papero, tiel ĝi perdos la supefluan akvon. Ni aldonos la salon.

Ni enmetos la bendojn de melongeno en la farunan paston, friktante ilin poste en abunda oliv-oleo.

Fine ni metos la friktaĵon sur telero kaj ni aspergos ilin per melaso.

BONAN APETITON !!!

Poezio

Vojo

Miaj piedoj lacas,
dum la samaj steloj
lumigas malsaman vojon.

Eble la horo alvenis
kaj tion mi ne rimarkis.

Hejmo silenta kaj amema
atendas mian revenon,
sed mi ne kutimas memori pri tio.

Nuboj subitaj kaj karmezinaj
pentras la aŭroron per matenaj ventoj.

Mi ne rigardos malantaŭen,
kvankam miaj okuloj sopiras blankajn murojn,
tiujn fenestrojn vestatajn per rosmarenoj.

Kredu, ke mi revenos, kara.
Mi kredis, ke mi forirus
kaj nun miaj piedoj desegnas vojojn
sub ĉielo de karmezinaj nuboj.

Eble la tempo alvenis,
dum la steloj daŭre lumigas
kamparojn kaj nekonatajn vilaĝojn.

Hejmo vokas min, milde, mallaŭte,
per miaj sonĝoj kaj maldormo.

Vi kredis, ke vi forirus –ĝi diras-,
kaj nun viaj piedoj desegnas vojojn
sub karmezina suno de ĉielbluaj ventoj.

Morgaŭ mi restos ĉi tie,
mi atendas ankoraŭ.

Eble momento alvenis –mi respondas-.
Sed miaj piedoj senĉese serĉas novajn vojojn
sub malkvietaj papilioj de karmezinaj flugiloj.

Kie mi troviĝos morgaŭ?
Eble alvenis la horo de la reveno…

Fátima

LA DIVERSIDAD LINGÜÍSTICA COMO RECURSO EDUCATIVO EN LA ENSEÑANZA DE LA HISTORIA EN EL ÁMBITO MULTICULTURAL

Antonio Fabián Jiménez

En el ámbito intercultural de la Unión Europea junto a los desafíos que supone la creciente presencia de la inmigración en el espacio educativo, se hace necesario por no decir ya del todo imprescindible abordar nuevas perspectivas y metodologías que posibiliten la existencia de una verdadera Educación Multicultural capaz de tender puentes entre culturas, prevenir posibles conflictos de carácter racista o xenófobo y promover al mismo tiempo el enriquecimiento cultural del conjunto del alumnado.

Sin lugar a dudas uno de los principales problemas o desafíos con el que nos encontramos a la hora de llevar a cabo una verdadera educación multicultural en la que se hayan presentes alumnos de muy diverso origen y procedencia étnica y lingüística, es sin lugar a dudas el de la lengua materna. Para ello debemos abordar estrategias puente que posibiliten un acercamiento paulatino de este alumnado cuya lengua materna no es la mayoritaria, a través de estrategias amigables basadas en la empatía y el acercamiento por ambas partes, despertando la curiosidad y el interés recíproco entre la cultura de acogida y la cultura del alumno de origen distinto.

La lengua puede ser considerado un obstáculo, una barrera o un problema, o por el contrario un puente, o una vía de acercamiento, todo depende desde el punto de vista desde el que se quiera abordar la situación, así podemos buscar las semejanzas entre los idiomas que por ejemplo posean un origen común como es el caso del español y del rumano, destacando los elementos comunes y señalando las diferencias, podemos usar las lenguas también como un verdadero recurso educativo sobre todo cuando se trate de lenguas presentes en la educación bilingüe de nuestros centros como es el caso del inglés, el francés o el alemán, con lo que el alumnado que posea uno de estos idiomas como lengua materna puede llegar a convertirse en protagonista, y servir de apoyo y ayuda para el desarrollo y el aprendizaje del resto de sus compañeros. Por último en casos en los que no exista relación alguna entre la lengua de enseñanza (el español) y la lengua materna del alumno recién llegado no tengan nada que ver, por ejemplo el chino, el húngaro o el ucraniano, podemos despertar en el alumnado la curiosidad a cerca de esas lenguas y de los pueblos y las culturas donde las usan.

Dentro de la asignatura de Historia es precisamente este interés por lo cultural, por las características de los pueblos y de los países que hablan una determinada lengua, o el plantearse el porqué hablan dicho idioma y no otro, el punto donde debemos incidir para posibilitar una mayor comprensión del otro, incentivar el acercamiento y evitar el aislamiento entre los alumnos cuya lengua materna no es la española.

Encontrar un recurso eficaz, neutral que propicie la curiosidad hacia otros pueblos y culturas no ya de un determinado país o una nación en concreto sino de todo el mundo en su conjunto, supondría un elemento fundamental a la hora de establecer unas relaciones neutrales y democráticas en las que todo el alumnado parta en igualdad de condiciones y no existan ventajas ni desventajas dependiendo del origen étnico, lingüístico o cultural del que se proceda.

Dicha herramienta podemos encontrarla en el Esperanto, una lengua planificada, versátil y de una gran sencillez para su aprendizaje que podría servir dentro del grupo-clase como una búsqueda equitativa y democrática en la que tanto alumnos cuya lengua es la mayoritaria como aquellos alumnos cuyos idiomas son una minoría parten desde cero para a través de la lengua internacional propiciar un encuentro y un conocimiento mutuo sin que ninguno ostente una posición de privilegio. De esta forma a través de ejercicios muy simples en los que no es necesario el uso de ninguna otra lengua más que del esperanto como idioma vehicular o auxiliar, el alumnado hispanohablante se pone por unos momentos en los zapatos de sus compañeros y experimenta en si mismo las dificultades y la problemática de tratar de entenderse y de ser comprendido en un idioma que no es el propio, con lo que se fomenta un espíritu de tolerancia, solidaridad, comprensión y respeto hacia el otro, mientras que los compañeros que aún no dominan la lengua mayoritaria dejan de sentirse en inferioridad de condiciones encontrándose al mismo nivel que sus compañeros en una lengua sencilla que en un brevísimo tiempo les permite comunicarse de forma fluida con el resto de sus compañeros y que por sus características estructurales, léxicas y gramaticales harán más sencilla la transición hacia el conocimiento de la lengua mayoritaria, en este caso el castellano.

La creación de un *"Taller de Esperanto"* en el centro educativo multicultural plantea por lo tanto numerosas ventajas educativas:

- Posibilita la creación de un espacio educativo de **igualdad** en el que todos parten de unas mismas condiciones.
- Desarrollo de valores como *la comprensión, la tolerancia y la solidaridad* al comprobar las dificultades que debe afrontar el

alumno extranjero para su integración en una lengua que no es la propia.

- Interés e intercambio de ideas sobre las diversas culturas mediante la creación de una imagen positiva valorando la diversidad cultural como una riqueza.
- Desarrollo de unos parámetros lingüísticos y gramaticales básicos intrínsecos a la lengua internacional que por su valor propedéutico facilitarán el aprendizaje y la adquisición de otros idiomas.
- Posibilidad de intercambios culturales y comunicación fluida con alumnos y alumnas de otros centros educativos de la Unión Europea o de cualquier parte del mundo en los que también se está llevando a cabo dicho trabajo.
- Relacionar la evolución de las diversas lenguas con los procesos históricos respectivos de los distintos pueblos. Por ejemplo la caída del Imperio Romano y el nacimiento de las lenguas romances.

Memoru, ke post la ŝanĝoj ĉe la interreta servilo de la Esperanto-Movado en Andaluzio la adresoj estas jenaj:

TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.org

Por kontakti kun:

- Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
  aeu @ esperantoandalucia.org
- Esperanto-Klubo Aksarkio
  axarquia @ esperantoandalucia.org
- Jaena Esperanto-Asocio
  jaen @ esperantoandalucia.org
- Esperanto el Kadizo
  cadiz @ esperantoandalucia.org
- Kordova Esperanto-Asocio
  cordoba @ esperantoandalucia.org
- Malaga Esperanto-Asocio “Marbordo de la Suno”
  malaga @ esperantoandalucia.org
- Onuba Esperanto-Asocio
  huelva @ esperantoandalucia.org

Turismi en ... MOTRIL

Motril estas bela vilaĝo kiu situas inter Granado, Malago kaj Almerio, meze de la tiel nomata *tropikala marbordo* de la Mediteranea Maro en Andaluzio. Kvankam kiam oni parolas pri Granado oni ĉiam pensas pri arabaj monumentoj aŭ pri neĝa montaro, oni devas diri, ke ĉi tiu andaluza provinco ankaŭ posedas marbordon, kie estas eble navigacii, fiŝkapti aŭ simple ripozi apud la maro ĉe trankvilaj plaĝoj. La loko kie oni povas plenumi ĉi ĉion estas Motril.

Historio

Apartenantaj al la 4-a jarcento a.K. estas eble trovi restaĵojn de la fenica kulturo. Ĉi tiu popolo starigis fiŝkapt-centrojn tra la tuta mediteranea maro, unu el tiuj lokoj estis Motril, kaj jen la origino de la vilaĝo. Dum la romia epoko Motril estis malgranda vilaĝo tuj apud la grava urbo *Sexi*, la aktuala Almuñecar. La kvalito de la maraj produktoj de tiu zono estis vaste konata en Romo, kiu konstruis la *Via Heraclea*, vojo trapasanta la tutan mediteranean marbordon. Ankaŭ oni devas elstari la fakton, ke la kartaga generalo Anibal, elŝipiĝis en ĉi tiu zono okaze de sia milita vojaĝo el la nordafrika Cartago ĝis la romiaj apudaĵoj.

Sed tutcerte estis la araba civilizacio tiu kiu starigis la nuntempan Motril, kaj ili eĉ donis al ĝi la nomon "Mu tra yil". Por certigi la strategian gravecon de la loko la araboj konstruis muregon kaj turojn. La kristanoj konkeris la urbon en la jaro 1489 kaj en la jaro 1507 oni definitive forpelis la moriskojn.




Blazono de MOTRIL

Pro ĉi tiu forpelo de la decendantoj de la araboj la vilaĝo ege malkreskis kaj pro tio estis necese repopoli la tutan zonon. Ankaŭ oni starigis novan muregon, pli granda ol tiu konstruita de la islamoj, ĉar oni celis defendi la vilaĝon el la konstantaj atakoj de la berberaj piratoj. La reĝo Filipo la 2-a donis al Motril la urban titolon dank'al ĝia graveco en la lukto kontraŭ ili. En la jaroj 1884 kaj 1885 Motril suferis du fortajn tertremojn kiuj provokis grandan detruon kaj

centojn da viktimoj. Fine de la 19a jarcento Motril disvolviĝis laŭ du flankoj, unu la agrikulturo bazita sur la kultivado de sukerkanoj kaj la produktado de sukero, melaso kaj rumo; kaj due la fiŝkaptado. Nuntempe Motril forgesis tiun agrikulturan produktadon kaj lastatempe ĝia ekonomio turnas sin al la turismo.

Monumentoj

• La Urbodomo.-



La nuntempa urbodomo stariĝis meze de la 17-a jarcento, temas pri baroka konstruaĵo konstruita simile al tiutempaj italaj palacoj.

• Kastelo de Carchuna.-
Starigita en la jaro 1777 cele al la defendado de la urbo kontraŭ la berberaj piratoj. Unuamomente ĝi posedis 3 grandajn turojn, bedaŭrinde nuntempe ĝi estas preskaŭ tute detruita. Ĝi troviĝas tuj apud la maro, la graveco de ĉi tiu kastelo pruvas la fakton, ke post ĝia konstruo la atakoj de la piratoj definitive ĉesis.

• Palaco de la Grafino Torre-Isabel.-
Konstruita fine de la 17-a jarcento, suferis ŝanĝojn dum la 19-a kaj 20-a jarcentoj, hodiaŭ estas la sidejo la Kultura Departmento de la Motrila Urbodomo. La ŝtuparo kiu eblas la eniron en la unuan etaĝon estas impona. Ĝi ankaŭ posedas belajn ruĝ-kolorajn kolonojn konstruitaj laŭ la itala stilo.

• La Domo de la Palma.-
Origine ĝi estis fabriko produktanta sukeron, ĝi apartenis al morisko sed post la ribelo de la jaro 1569 la reĝo konfiskis la apartenaĵojn de la idaro de la antikvaj islamoj. Temas pri impona konstruaĵo U-forma. La dekoracio estas tipe moriska.



Aera Bildo de Motril


Festoj

• Majaj Krucoj.
La 3-an de majo oni starigas ĉe stratoj kaj placoj floraj krucoj

• Pasko.
Kiel multaj aliaj andaluzaj urboj kaj vilaĝoj, ankaŭ Motril posedas vizitindan paskajn festojn, oni devas elstari la Paskan Dimanĉon.

• Tago de la Tertremoj.
Oni memoras la tagojn de la jaroj 1884 kai 1885 kiam oka-

zis teruraj tertremoj. La festo estas dank-ofero al Jesuo kaj al la Virgulino Maria por protekti la urbon dum tiuj tagoj por eviti la tutan detruon.



Kabo Sacratif
ĉe la Motrila Marbordo

Tipaj Manĝaĵoj

Kelkaj el la plej bongustaj motrilaj manĝaĵoj havas moriskan originon, tamen oni ne devas forgesi, ke Motril havas tre aktivan fiŝkapt-sektoron kaj krome, ke la tropikaj produktoj estas abundaj en la kamparo.

La *Torta de Al-Haju* oni povas manĝi okaze de la maten-manĝado, ĝi estas moriska manĝaĵo kaj ĝiaj ingredientoj estas migdaloj, faruno, sukero kaj cinamo.

La *Ajillo Cabañil* estas tradicia kuirao kie kaprido estas la ĉefa ingrediento.

Bongustega estas la *Salamandraña* fiŝkuiraĵo, kvankam ankaŭ eblas uzi kian ajn viandaĵon, tre bone akompanitaj de legomoj kiel kukurboj, terpomoj, cepoj, tomatoj ktp.

Venontnumere....

LUCENA (Kordovo)

Preĝejo El Carmen



Jen la maniero solvi la

La Ondanta Fervojeto


Entute aperas 25 vortoj. La unua vorto estas **BRITONO**, do la dua egalas al *Britono* minus unu litero; la tria egalas al la dua vorto minus unu litero, kaj tiel plu ĝis la 7-a formita nur de unu litero. La vorto 8-a egalas al la 7-a plus unu litero, kaj tiel kiel *ondanta fervojeto* ĝis la vorto 25-a kiu estas **SKUALOJ**. Jen la difinoj de ĉiuj vortoj.

2. Kurba linio, laŭirata de planedo dum ĝia rondiro ĉirkaŭ alia astro.
3. Civitano de eŭropa lando apartenanta al la Eŭropa Unio.
4. Prefiso uzata por indiki la ĉeeston de molekulo de ribozo.
5. Marŝo.
6. Nedifina pronomo, montranta iun objekton, aferon aŭ ideon.
7. Verba finaĵo.
8. Sufikso montranta estaĵon apartenantan al la sekso organizita por gravediĝi kaj naski.
9. Posedata de ni.
10. Internacia scienca prefikso, signifanta "kontraŭ", "opozicie al".
11. Adjektive kaj akuzative, ideala modelo, tiu kiu prezentas altagrade en si la karakterizajn ecojn de iu speco de personoj aŭ objektoj.
12. Natura verdgriza tavolo kreiĝanta sur ŝtono, vitro aŭ sur metaloj, pro malkombina efiko de aero, akvo aŭ tero.
13. Naskintino de ido.
14. Grupo da homoj, havantaj la samajn politikajn opiniojn.
15. Io, kio povas esti facile apartigita de tuto.
16. Estanta en pli ol sufiĉa kvanto aŭ grado.
17. Ia nombro da samspecaj objektoj, kiuj ne estas esence ligitaj inter si kaj ne prezentas kune ian unu ideon.
18. Nomo de konsonanto.
19. Sustantiva finaĵo.
20. Cifero.
21. Demanda neŭtra pronomo por demandi pri afero aŭ besto.
22. Malgranda insekto kies inoj suĉas sangon de mamuloj.
23. Organo de la vidkapablo.
24. Adjektive, linio, aŭ aro da linioj, ĉiu el kies punktoj plenumas donitan kondiĉon.

La Ondanta Fervojeto

B
R
I
T
O
N
O

S
K
U
A
L
O
J



1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13

14 15 16 17 18 19 20 21 22 23 24 25 26

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La miraklo-fara sanktulo Custodio

La sudo de la jaena provinco, tuj apud la granada landlimo, estas zono plena je misteroj, ĉefe se paroli pri sanigantaj kaj miraklo-faraj sanktuloj. Ili estas tiuj personoj loĝantaj en ruraj etosoj kiuj, laŭ kredo de granda nombro da personoj, kapablas resanigi aliulojn.



La Sanktulo Custodio

Kvankam tiuj personoj ĉiam ekzistis verdire la plej konata en la zono estas la *Sanktulo Custodio* (prononcu *Kustodjo*). Oni diras, ke li ricevis sian "povon" en la jaro 1911 kiam li estis 26-jaraĝa. Laŭ la legendo, li ricevis mesaĝon de la Virgulino Maria sciiganta al li, ke lia 4-jara filino mortus kaj ke, li povus fari nenion por eviti tiun sorto-baton. Jesja, kiam li revenis hejmen la tuta domo bruliĝis kaj lia filino mortis. Post ĉi tiu misfortuno la vizio diris al li, ke li kapablus resanigi aliajn personojn, ĉu korpe ĉu mense.

La unuaj "miraklaj" resanigoj okazis post kelke da tempo. Multaj personoj venis ĉe li por ricevi liajn sanigajn masaĝojn aŭ simplajn blovojn, laŭ la opinio de multaj kredemuloj tio nur sufiĉis por resanigi la malsanulojn. La aŭtoritatuloj baldaŭ konis la aferon kaj oni decidis enkarcerigi lin por eviti la pilgrimadon en la vilaĝon Noalejo, kie li loĝis. La legendo rakontas, ke la pend-seruroj fermitaj dum la nokto en la prizono, aperis malfermitaj dum la mateno. Ĉar li kulpis pri nenio la aŭtoritatuloj devis liberigi lin, tio provokis ke la konstanta pilgrimado eĉ pligrandiĝis.


Kredemuloj venis el la tuta Hispanio, iuj asertis, ke liaj malsanoj malaperis, aliaj, ke la sanktulo kapablis vidi la estontecon kaj pro tio ili ricevas saĝajn konsilojn. Tio tute certa estas la fakto, ke li ricevis nenion kiel pagon, li nur petis fidon kaj la starigon de preĝejeto ĉe loko preskaŭ ne-alirebla, kvankam li admonis, ke iam eĉ la aŭtomobiloj povus atingi tiun lokon, li pravis.

En la monato aŭgusto 1961, Angel Custodio forpasis. Ĉeestis la entombigon miloj da personoj el apudaj kaj foraj lokoj, eĉ ĵurnalistoj venis, tamen neniu fotografaĵo ekzistas pri tiu momento, laŭ la ĝenerala kredo ĉiuj fotografaĵoj nigriĝis. La Katolika Eklezio en Jaeno informis pri la forpaso de persono "de simpleca religio, sed neniel miraklo-fara sanktulo". Dum kelkaj jaroj du civil-gvardianoj malpermesis la eniron en tiun parton de la tombejo por eviti pilgrimadojn.

Sed, oni diras, ke paraliza filo de unu el la gvardianojo resaniĝis kaj tuj oni permesis la viziton al la tombejo de la *sanktulo Custodio.*

Oni parolis poste pri personoj kun diversaj malsanoj kiuj mirakle resaniĝis kaj multaj aliaj aferoj. Vero aŭ malvero, sed tute certas la fakto, ke la fido kapablas atingi miraklojn, kaj ke eĉ nuntempe la tombo ricevas ĉiutage vizitojn de personojn posedantajn aŭ serĉantajn tiun fidon.

HUMORO



Ege interesa !!! Ĝi similas al 2 Mb arkivo, portebla kaj ne estas necese elŝuti ĝin... Kiel Vi diras, ke ĝi nomiĝas? ...Ĵurnalo?

FLAMENKO



José MONGE,
Camarón de la Isla

José MONGE CRUZ naskiĝis en la urbo San Fernando (Kadizo) en la jaro 1950. Ekde lia infan-aĝo li konis la flamenkan etoson, lia patro laboris en forĝejo kaj lia patrino estis korbo-faristino. La infana José, pro sia maldikeco kaj sia blonda hararo, ricevis la krom-nomon *Camarón*, vorto kiu en la hispana lingvo signifas "salilokon", tiu malgranda kaj blanka krustaco. La nomo "de la Isla" indikas la naskiĝ-lokon de *Camarón*, tio estas San Fernando, urbo ankaŭ konata kiel "la Insulo".

La frua morto de lia patro kaŭzis ekonomiajn problemojn en la familia de José MONGE, do li, apenaŭ dekjaraĝa, devis ekkanti ĉe la gastejoj proksimaj al la urbo San Fernando por gajni iom da mono. 12-jaraĝa li atingis la unuan premion okaze de Flamenka Konkurso en la kordova vilaĝo Montilla kaj 16-jaraĝa, post la atingo de la prestiĝa unua premio de la flamenka festivalo de Mairena del Alcor en Sevilo, li dediĉis sin profesie al la flamenka kantado.

Li foriris en Madridon kiel membro de la Flamenka Kompanio de Miguel de los Reyes kaj Dolores Vargas. Li kantis en la plej fama loko de Madrido pri flamenko, la flamenkejo "Torres Bermejas", tie li konis la faman gitariston Paco de Lucía, apud kiu li surdiskigis naŭ diskojn inter la jaroj 1969 kaj 1977. En la jaro 1979 li aperigis sian plej faman diskon "La Legendo de la Tempo", revolucia disko kie li miksis flamenkon kun ĵazo kaj rokenrolo. Entute li surdiskigis 19 diskojn, unu el ili "Mi estas Cigano" de la jaro 1989 estis la plej vendata en la historio de la Flamenko. En la jaro 1992 li aperigis sian lastan diskon kaj en tiu sama jaro li, 41-jaraĝa, mortis en Barcelona.

La famega Manolo Caracol diris pri li: "Camarón estas dolĉa infano. Ĉiuj maljunaj kantistoj samopiniis pri lia mirinda kant-stilo, kaj novaj kantistoj sekvas lin. Krome la publiko de aliaj muzikaj stilo alvenis en la flamenkon dank'al Camarón de la Isla".

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Sekretario: Julio Herrero Segura
Kasistino: María Dolores Torres Mateos
Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com


TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.org

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

NOVA ADRESO DE LA INTERRETA PAĜO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO



esperantoandalucia.org